Interretaj lingvoj

**Malpli da Angla**

La angla lingvo sendube estas monda lingvo. Kaj ĝis nun la Angla estis ankaŭ la "Lingvo de Interreto". Iom post iom tio tamen ŝajnas ŝanĝiĝi. En Ciberspaco *(Cyberspace)* aliaj lingvoj konsiderinde rapide kreskas.

En la jaro 1996 la Angla estis por 80% de ĉiuj ret-uzantoj fakte "la interreta lingvo". Tiu procentaĵo tamen intertempe malplialtiĝis al nur preskaŭ 50%.

Kontraŭe plialtiĝis la ĉina lingvo en la sama periodo de 1% al 7.6% kaj la Germana de 1% al 5.9%. Treege kreskis ankaŭ la Japana kaj la Hispana. Tion enketis *Global Research (http://glresearch.com).* Laŭ la aktualaj prognozoj, la angla lingvo ĉirkaŭ la jaro 2004 nur partoprenos kiel interreta lingvo je 35%. (Fonto: *cid*)

Speciala rilato al cifero 9

**Iom forgesita pasintjara jubileo - *Alexander von Humboldt***

En la pasinta jaro ni festis la 250an naskiĝdatrevenon de *Johann Wolfgang von Goethe*, kaj certe multaj memorfestoj okupiĝis pri ties vivo kaj verkaro. La longjara laboro de la granda poeto ekde 1775 je la kortego de duko *Karl August* en *Weimar* estis sendube kaŭzo, ke tiu urbo pasintjare estis elektata 'monda kultururbo'.

Sed ni ankaŭ devis honore memori grandan naturscienculon, kiu ne nur estis bona amiko kaj admiranto de *Goethe*, kaj lin eĉ vizitis en la nuna monda kultururbo, kaj por kiu la jaro 1999 ankaŭ estis jubilea jaro: nome *Alexander von Humboldt*, kiu naskiĝis antaŭ 230 jaroj en Berlino je la 14a de septembro 1769, li do estis 20 jarojn pli juna ol *Goethe*.

*v.Humboldt* daŭrigis sian en *Frankfurt ĉe Oder* komencintan studadon 1789 en *Göttingen*, la tiam plej grava Eŭropa universitato, en kiu, kiel li iam konstatis, "li akiris la plej gravan fundamenton de siaj sciadoj". La 5an de junio 1799, do antaŭ 200 jaroj, *v. Humboldt* komencis sian kvin jarojn daŭrantan esplorvojaĝon al Ameriko. Antaŭ 190 jaroj, la 12an de Aprilo 1829, li ekvojaĝis al Ruslando kaj Centralazio. Tiu vojaĝo kondukis lin ĝis la Ĉinuja landlimo kaj daŭris entute 8½ monatojn.

La verkoj de la fama naturesploristo grave influis la sciencon. Pleje konataj estas liaj libroj "Ideoj pri la geografio de la plantoj" (1807), "Opinioj pri la naturo" (1808, 2 volumoj) kaj la 5-voluma ĉefverko "Skizo de materia mondpriskribo" - grandioza sintezo de la naturscienca sciado liatempa.

*Alexander von Humboldt* certe havis specialan rilaton al la cifero 9, ĉar 1839, antaŭ 160 jaroj, li finis sian 34-voluman vojaĝraporton, kaj je la 6a de majo 1859 - en sia 90a vivjaro - li fine kaj por ĉiam metis sian skribilon el la mano. Tiuj donitaĵoj pravigas nin, ke oni ankaŭ povas alrigardi la jaron 1999 kvazaŭ kiel *"Alexander von Humboldt*-jaron". *(sa)*



## Raporto pri la jarkunsido 2000 de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

La ISAE-jarkunsido okazis dum la 85a Universala Kongreso de Esperanto en Tel-Avivo ( 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2000), je vendredo, la 28a de julio, de la 15a h ĝis la 16.30a h en salono *Olswanger*. Ĉeestis 16 personoj. Prezidis la prezidanto, *prof. dr. R. Sachs*. Ne ĉeestis aliaj estraranoj. Je propra iniciato la subskribinto, iama ISAE-estrarano, prenis notojn por redakti raporton (konstatinte ke neniu estis komisiita pri tio).

La prezidanto salutis la ĉeestantojn kaj atentigis pri la ĉeesto de reprezentantoj de Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo (d-ro *W.M.A. De Smet*) kaj de Universala Medicina Esperanto-Asocio (d-ro *I. Ferenczy*). Ankaŭ ĉeestas (sed devis poste foriri) d-ro *Petro Chrdle*, kiu organizos en novembro sciencan simpozion (KAEST) en Prago. Neniu el la aliaj anoj de la nova estraro povas ĉeesti. Pro diversaj cirkonstancoj la estraraj taskoj ne jam estas dividitaj kun la rezulto, ke la prezidanto devas okupi pri tre diversaj agadoj. La prezidanto levis la demandon kiu fakte estas "sciencisto". Li tiusence referis al la historio de ISAE, ĝiaj rilatoj kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, IKU (Internacia Kongresa Universitato) kaj aliaj organizaĵoj. La nuna ISAE ne estas forta (malpli ol 200 membroj) sed ĝia asocia organo (Scienca Revuo) regule aperas kaj akiris bonan kvaliton. Pri la scienca agado de ISAE estas jen kaj jen kelkaj novaj ekzemploj, ekz. aperonta kompendio pri parazitologio.

Poste s-ro *John Rapley* petis atenton pri la recente aperinta unua numero de esperantlingva revuo pri astronomio, kaj li atentigis, ke fondiĝos fakasocio de esperantlingvaj astronomiistoj. La ĉeestanta gvidanto de tiu fondota asocio, d-ro *Alexander Mikishev*, kaptis la okazon por informi pri tiu asocio, ĝia revuo kaj ĝiaj perspektivoj *(redakta noto: sekvas detala raporto pri AEK)*. Post tiuj intervenoj la etoso iĝis pli vigla, kaj rezultis esprimoj de ideoj. La usona ISAE-delegito, *John Gamble*, deziris scii kia diferenco estas inter membro kaj abonanto. D-ro *I. Ferenczy* pledis por pli rekta kunlaboro inter UMEA kaj ISAE. D-ro *Chrdle* invitis al partopreno en la de li organizota simpozio KAEST en Prago.

Demandoj estas farataj pri la ĝis nun ne pritraktitaj sed tamen esencaj temoj, ekz. kiaj estas la raporto pri la vivo de la asocio en la pasinta jaro kaj la financa stato. Sed pro la fakto, ke jam estis pasinta la antaŭvidita tempodaŭro de la kunsido (alia kunsido devis poste okazi en la sama salono), kaj ke nur unu estrarano (la prezidanto) ĉeestis, la respondoj devos esti donataj je alia okazo. La kunsido finiĝis je la 16.30a h. En la koridoro oni ankoraŭ elŝanĝis kelkajn ideojn pri la nuna stato kaj la estonteco de ISAE. (Farita de d-ro *W.M.A. De Smet* je 24.8.2000 surbaze de notoj prenitaj dum la kunsido).